# STARTO

## N-ro 1/2025 (294)

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**





*Foto Milan Kolka*

Brno gastigos
la 110-an Universalan Kongreson de Esperanto
26.7. – 2.8. 2025

# Simon Marius kaj Galileo Galilei

La 26-an de decembro 1624 laŭ julia kalendaro kaj la 5-an de januaro 1625 laŭ gregoria kalendaro forpasis germana matematikisto, kuracisto kaj astronomo Simon Mayr, kiu sin nomis Marius (1573-1625). Samtempe kaj sendepende de Galileo Galei li malkovris la kvar satelitojn de Jupitero, sed ĉar li publikigis sian malkovron nur en la jaro 1614 en verko *Mundus Iovalis*, dum Galileo jam en 1610, Galileo lin kulpigis pri plagiato. Ankaŭ la fama Otto-enciklopedio diras, ke ia Šimon Mayr atakis Galileon. Pro tio li estis elpelita el la scienco kaj historio kaj preskaŭ forgesita, kvankam la nomoj de la satelitoj *Io, Europa, Callisto* (amatinoj de Zeŭso) kaj *Ganymedes* (favorato de Zeŭso) devenas el lia publikaĵo. Tamen li modeste konfesas, ke la nomojn elektis Johano Kepler, kiam ili renkontiĝis en Regensburg. Krom tio Marius vidis kelkajn detalojn de la satelitoj, kiujn Galileo pretervidis.




Nun oni klopodas rehonorigi la sciencistgot kaj helpe de Esperanto tradukigi la retejon pri liaj vivo kaj verko en aliajn lingvojn. Pri la ĉeĥa traduko jam inter la jaroj 2013-2018 estis petita M. Malovec de Sabina Hauge, kiu tiutempe kontroladis Startojn.

Interese estas, ke en la jaro 2023 aperis esperantlingva traduko de la dramo *Vivo de Galilei* fare de Bertold Brecht (1898-1956), kiu priskribas, kiel Galileo malkovris la satelitojn de Jupitero, sed vane klopodis konvinki religiajn fanatikulojn, ke la lunoj flugas ĉirkaŭ Jupitero. Ili eĉ ne volis rigardi en lian teleskopon. Sed niaj membroj en la asocia kongreso en Pardubice (2022), kiam ili vizitis lokan stelobservejon, rigardis tre volonte kaj vidis ĝuste Jupiteron kun ĝiaj kvar lunoj.

Sed ni revenu al Simon Marius kaj lia retejo https://www.simon-marius.net. Li devenis el Gunzenhausen, sed travivis preskaŭ la tutan vivon en Ansbach, kie li estis en 1601 nomumita juĝeja matematikisto. Samjare li foriris al Prago por konatiĝi kun novaj observaj teknikoj de Tycho de Brahe; post ties morto li forveturis studi medicinon al Padovo, kie li doktoriĝis en 1605.

La Internacia Astronomia Unio honorigis Marius, kiam ĝi nomis per lia nomo unu asteroidon kaj lunajn krateron, montetojn kaj kanalon. Gimnazio en Gunzenhausen akceptis lian nomon. En urboj, kie li aktivis, ekzistas stratoj kun lia nomo.

Li postlasis 6 sciencajn verkojn, 29 kalendarojn (1601-1629), 3 verkojn, kiujn li kunaŭtoris, al kelkaj li kontribuis per artikoloj. La rubriko *Sekundara Literaturo* en la retejo listigas preskaŭ 250 verkojn, kiuj estas dediĉitaj al li aŭ mencias lian laboron.

Tamen li restas nekonata de la vasta publiko, dum Galileon konas ĉiuj. Maljustan senhonorigon ĉiam estas malfacile korekti.

*Miroslav Malovec*